LSG FORUMO n–ro 139
(1 - 2 / 2008)
Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

# UK 2008 : Roterdamo bonvenigas vin



ENHAVO

**LSG: ĜENERALKUNVENO 2008**
Tagordo, lasta protokolo p. 3
Pri kio diskuti en Roterdamo, Demisio de funkciuloj p. 4
Nia programo dum la UK p. 5

**EŬROPAJ KORTUMOJ:** Du juĝoj pri samseksaj paroj
Fratinoj ne rajtas edziniĝi p. 6
Partnero ricevas pension p. 7

**KACOJ** La plej longaj estas la francaj? p. 8
**KACULOJ** Specialaj necesejoj en Tajlando p. 9
**PORNOGRAFIO** Du landoj, du konceptoj p. 10

**TEMOJ**
Danĝeroj: Kajman-Insuloj, Teksaso, Filipinoj p. 11
Pri mortoj: Francujo, Danujo p. 12

# L. S. G.

**Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj**

interretejo: http://lsg-esperanto.org
adreso: la sekretario (vidu sube)
membriĝo: ĉe la sekretario
kotizoj: 10 EUR por 1 jaro
25 EUR por 3 jaroj

**Estraro**

prezidanto [arvimide (ĉe) earthlink.net]
Arnold VICTOR, Usono
Apartment 1, 160 West Eleventh Street
New York City, New York 10011, USA

sekretario [lasekretario (ĉe) gmx.net]
kaj kasisto [lakasisto (ĉe) gmx.net]
Rolf , Germanio

varbado [fsoghomonian (ĉe) yahoo.fr]
Francis, Francio

estraranoj [kvakke (ĉe) hotmail.com]
Torstein, Norvegio

retejo [randy.dean (ĉe) pobox.com]
Randy DEAN, Atlanta, Usono

## FORUMO 139

**Membrogazeto de la LSG (1/2 2008)**

adreso: la sekretario (vidu supre)
redakcio: [laredaktanto (ĉe) gmx.net]
Bernvardo, Germanio, k.a.

interreta versio: La gazeto aperas ankaŭ interrete kiel PDF-dosiero (vidu interretejo) Por via integro ĉiuj eventualaj familiaj nomoj kaj adresoj estas forigataj en la interreta versio.

ekspedo la sekretario (vidu supre)

**!** *Nepre **ne** kontaktu la personon sur la etikedo de la koverto. La persono **ne** estas ligano. Ni nur pro la favoraj poŝt-tarifoj forsendas la gazeton el Ĉeĥio*

## Saluton al vi ĉiuj

la malbona novaĵo tuj komence. Antaŭ kelka tempo mortis mia patro kaj pro tio nun estas multaj novaj kaj daŭraj taskoj por mi plenumendaj, aparte, ĉar ankaŭ la patrino iom post iom kadukiĝas. Mi ne plu, tion mi bedaŭre konstatis, povas ŝpari la tempon por plu produkti la gazeton. Eĉ tiun ĉi mi nur per granda streĉo povis redakti ĝis fino. Mi esperas, ke vi trovos novan redaktanton, al kiu mi helpos laŭ miaj povoj.

Tiun ĉi jaron la ĝeneralkunveno de la LSG estas pli grave ol kutime, ĉar ja lastan jaron en Japanio la ligo ne kunvenis. Do la temoj de du jaroj estas pritraktenda, sed la laboro verŝajne ne estas la duobla. Bedaŭrinde ankaŭ la prezidanto de la LSG, Arnold Victor, anoncis sian rezignon, kial la tasko trovi novajn funkciulojn estos urĝa. Por la farita laboro ankaŭ de tiu ĉi loko koregan dankon al Arnold.

Mi deziras al ĉiuj partoprenantoj de la kongreso plezuron kaj energion por la agado kaj al ĉiuj legantoj bonfarton kaj feliĉon por la estonteco

elkore adiaŭas

*Bernvardo*

**Kontribuoj por FORUMO kiel informoj, bildoj kaj artikoloj estas ĉiam bonvenaj**

*Vi bonvolu kompreni …*
*… ke nur libere uzeblaj kontribuoj povas esti akceptataj*
*… ke estas neniu garantio, ke alsenditaj kontribuoj estos publikigataj*
*… kaj ke materialo nur en esceptaj kazoj povas esti resendata al vi.*

*Ni konservas al ni la rajton redakcie ŝanĝi kontribuojn.*

*Nesignitaj artikoloj estas de la redakcio.*

# Ĝeneralkunveno de LSG dum la UK 2008 en Roterdamo

## Tagordo:

1) Elekti protokoliston, se la sekretario ne ĉeestas
2) Akcepti aŭ ŝanĝi la tagordon
3) Trovi raportistojn por:
   a) Kongresa Kuriero
   b) La Esperanta gazetaro
   c) Nacilingvaj gejaj gazetoj
4) Trakti la protokolon de la antaŭa ĝenerala kunveno
5) Trakti raporton kaj spezojn por la jaro
6) Trakti eventualajn landajn raportojn
7) Diskuti la agadojn de LSG kaj ĝian estontecon
8) Decidi la financan estontecon kaj la jarkotizon
9) Elekti prezidanton, kasiston, sekretarion, retprizorganton, estraranon por varbado kaj eventuale unu kroman estraranon
10) Diskuti la bultenon kaj ties redaktonto(j)n.
11) Debati eventualajn rezoluciojn
12) Eventualaj aliaj aferoj
13) Decidi pri dato kaj loko de venonta ĝenerala kunveno
14) Omaĝo al forpasintaj LSG-anoj
15) Fermi la kunvenon




## Protokolo de la lasta kunveno en Florenco (Represo el Forumo 135):

1. Unu ŝanĝo al la tagordo: Mauro parolis pri la jenaj aferoj:

a. Lundon vespere je la 19h30 LSG-anoj estos akceptitaj ĉe la kunsido de loka geja organizajo. Tiuj, kiuj volas tien promeni grupe estu antaŭ la kongresejo je la 19h00.

b. Mauro anoncis la prezon de la busveturo (26.50 EŬR) por la merkreda ekskurso kaj ke ne plu eblas aliĝi pro manko de spaco. Ĉiu pagos individue manĝon kaj eniron al muzeoj kaj monumentoj.

2. Todd (Toĉjo) PHILLIPS akceptis esti la raportisto de la kunveno.

3. Arnold resumis la protokolon de la pasintjara kunveno en Vilno. Ne estis sugestitaj ŝanĝoj al tiu protokolo.

4. Arnold menciis, ke estos denove LSG-budo jaŭdon en la kongresejo.

5. Arnold anoncis, ke pro fuŝo de UEA ne eblas prezenti financraporton ĉi-jare.

6. Landaj raportoj:

a. Francis S. estis kontaktita de franca geja televidkanalo kaj proponis eventualan televiditan debaton. Li ankaŭ sugestis, ke oni aperigu LSG-on en landaj gejaj jarlibroj.

b. Arnold raportis pri la ELNA-kongreso okazinta pasintsemajnfine kie li prelegis pri LSG kaj ties utileco al kaŝitaj gejoj en certaj landoj kaj pri nia eldona agado. Ĉeestis cirkaŭ 20 homoj, kelkaj negejaj.

7. Ni decidis, ke la LSG-kotizo ne ŝanĝiĝu ĉi-jare.

8. Elektado de estraro:

a. Arnold akceptis reesti la prezidanto pro manko de interesatoj. La ceteraj estraranoj tenos siajn postenojn.

9. Francoj nun povas pagi LSG-kotizon rekte al Francis S. kaj usonanoj al Arnold.

10. Rezolucioj

a. Okazis maltrafoj partopreni demonstraciojn en Latvio kaj Pollando pasintjare. Sugestitas, ke ni klopodu esti pli aktivaj en tiaj aferoj.

b. Francis S. proponis, ke LSG aliĝu al ILGA. Ni akceptis proponon de Torstejn pristudi la eblecon aliĝi kaj ni decidu venontfoje.

11. LSG decidis ne kunveni venontjare en Jokohamo. Ni ja kunvenos en 2008, supozeble en Eŭropo.

12. Starado por forpasintaj LSG-anoj.

**Rezignas prezidanto Arnold Victor:**

"Mi ne kapablos viziti la UK-on 09 en Pollando, kaj probable ankaŭ tiun de la sekva jaro. Mi urĝas al la estraro kaj membraro serĉi kandidatojn por prezidanto en nia kunsido en Roterdamo. Mi tre dankas por la honoro servi en tiu ĉi posteno kaj deziras al la sekva prezidanto samajn agrablajn spertojn.

Arnold Victor"

Retpoŝte alveninta je la 14a majo 2008

**Rezignas redaktanto Bernvardo:**

Karaj LSG-anoj. Pro malgajaj eventoj en mia familio kaj ties vere temporabaj konsekvencoj mi devis konstati kun granda bedaŭro, ke mi simple ne plu disponas pri sufiĉa tempo plu redakti FORUMON. Pro tio mi devas rezigni la redaktadon. Posteulo povas kompreneble demandi min pri konsiloj kaj certa helpo. *Bernvardo*

## Pri kio diskuti en Roterdamo?

Bedaŭrinde mi ne povos partopreni niajn kunvenojn en Roterdamo, ĉar mi atendas du okuloj-operacioj ĉe ambaŭ okuloj. Tial jam ĉitie kelkajn rimarkojn.

Kiel vi jam legis, Arnold kiel LSG-prezidanto nun volas demisii. Mi ne sukcesis denove persvadi lin, daŭrigi sian bonan kaj valoran laboron por nia ligo, kiun li plenumis. Pro tio ni volonte estas tre dankema al li. Li donis stabilecon al LSG dum multaj jaroj. Mi esperas, ke li ankaŭ future kunlaboros kun ni, minimume kiel nia usona peranto, kaj deziras al li la plej bonan por la estonteco!

Tamen vi devas dum UK elekti novan prezidanton. Laŭ mi tiu persono, kiel Arnold, devus esti longjara membro, kiu konas la ligon. Feliĉe ni havas en LSG plurajn tre taŭgajn personojn por tiu posteno. Mia propono estas Francis el Parizo. Nia aktuala estrarano por varbado kaj franca peranto estas membro ekde pli ol 20 jaroj kaj havas longjarajn spertojn kiel estrarano. Multfoje li demonstraciis sian fidelecon al LSG.

Alia problemo, kiun vi devas diskuti, estas nia membrofolio Forumo. Mi estas feliĉa, ke ni post Andreas, kiu aperigis ĝis ses ekzempleroj jare, kun Thomas denove trovis redaktanton. Sed ne estas facile, serĉi materialon, se la membraro ne kunagas. La gazeto nur povas esti vera forumo de nia ligo, se vi, ĉiu unuopulo, minimume iomete kunagas! Kion vi pensas pri la

ideo, havi du redaktantojn, kiuj komune respondecas la rezulton? En la tempo de interreto la distanco ja ne plu ludas ian rolon. Mi esperas, ke vi en Roterdamo trovas taŭgan personon kun komputilo kaj iom da scio de Word kaj Excel kaj kun freŝaj ideoj kaj la emo, diligente labori por nia ligo.

Bone agas nia retprizorganto Randy. Elkoran dankon do ankaŭ al li!

Se vi elektus Francis kiel prezidanton, ni bezonas novan estron por varbado. La ĉefa tasko de tiu persono estas, evoluigi moderna(j)n varbanonceto(j)n pri LSG por la Esperanto-gazetaro kaj kontakti tiujn gazetojn. Ankaŭ en la reto ni povus prezenti nin en tre diversaj esperantopaĝoj, ĉu ne?

Mi, intertempe la 8-an fojon, deklaras mian pretecon, denove plenumi la taskojn de sekretario kaj kasisto por la sekvonta jaro. Se vi elektas min, mi dankas por la denova konfido!

La kasistan raporton por 2008 vi ricevos kune kun la unua Forumo 2009. Mi proponas, ke la membrokotizo restu, kiel ekde jam 8 jarojn, stabila. Tamen ni devas pripensi plialtigi ĝin sekvontjare modere, se la dolarkurso restos tiel malforta kiel ekde multaj monatoj. La inflacio bedaŭrinde ankaŭ nin trafas kaj preskaŭ ĉiuj prezoj plialtiĝas de jaro al jaro. Ni tamen devas financii presadon, kopiadon kaj afrankokostojn de Forumo, devas regule pagi por nia retpaĝo, por esti fakgrupo de UEA, por kunvenejoj ktp. Krome vi solidare ebligas kun via membrokotizo ankaŭ la membrecon de afrikaj samliganoj kaj tiuj el landoj kiel Kubo, Ĉinio kaj aliaj (ankaŭ en islama proksima Oriento), de kie oni ne povas sendi membrokotizon al la ligo.

Mi proponas, okazigi la sekvontan ĝeneralan kunvenon 2009 dum la UK en Bjalistoko.

*Rolf*

## Nia programo dum la UK

Kiel en ĉiu jaro LSG ankaŭ 2008 aktive partoprenas la Universalan Kongreson de UEA. Jam laŭ la ĝisnuna listo de partoprenantoj kelkdekoj da samliganoj ĉeestos.

Komencan sabaton okazos la movada foiro. Tio estos sinprezento de multaj Esperanto-organizoj en budoj. LSG vi trovas ĉe la tablo 34.

Dimanĉon prezidanto Arnold Victor gvidos la jarkunvenon1 de nia ligo.

Lundovespero okazos kunveno kun la nederlanda geja organizaĵo COC en ilia ejo en Schiedamsesingel 175 en Roterdamo (www.cocrotterdam.nl).

Ĵaŭdon ni havos dum duona tago budon en la kongresejo por prezenti nian ligon. Via kunlaboro tie estas same necesa kaj bonvena kiel jam dum la movada foiro!

Pro la granda sukceso de la ekskurso dum la Florenca UK, kion tre bone organizis Maŭro kaj Marko, ni planas denove komunan aranĝon por la ekskursa merkredo: Ni veturos al Amsterdamo kaj ĝuos la tiean specialan gejan / lesban itineron. Pli precizaj informoj pri tio kaj pri la kunveno kun COC vi ricevos dum nia dimanĉa jarkunveno de nia membro Bert, ano de la Loka Kongresa Komitato por informado. Lia kongresnumero estas 0089.

Do, denove plena programo! Partoprenu, kunlaboru kaj amuziĝu!

*Rolf*

# Eŭropaj Kortumoj: Du juĝoj pri samseksaj paroj

## Fratinoj ne rajtas edziniĝi

La Eŭropa Juĝa Kortumo Por Homaj Rajtoj en Strasburgo (Francio) ne havis kompaton kun la anglaj fratinoj 88jara Joyce kaj 90kara Sybil Burden. Per 15 kontraŭ 2 voĉoj la Strasburgaj juĝistoj decidis en apelacia proceso, ke la du britinoj ne rajtas registriĝi kiel partneroj, pro tio, ke ili estas fratinoj. Ja ankaŭ ne rajtas edziĝi frato kun sia fratino, tio ŝajne estas la jura bazo de la decido.

La oldulinoj, kiuj dum la tuta vivo vartis sin reciproke, volis per la registriĝo certigi, ke post la morto de unu el ili la alia ner perdu la komunan gepatran domon.

Ilia kaŭzo alstrebi tion estas malsama traktado en la brita leĝaro pri heredaj taksoj. Geedzoj kaj registritaj partneroj ne devas pagi tian takson, dum por gefratoj la takso estas 40 prcoentoj de tio, kio superas modestan sumon liberan. Ĉar la ambaŭ ne ŝparis reservojn por la kazo de la morto de unu, la postvivanto devus ne nur travivi la funebron pri la amata fratino, sed krome perdus la gepatran domon, malnovan farmon en la grafa regiono Wiltshire. La Burden'oj argumentis, ili tiel estus diskriminaciataj pro tio, ke ili dum siaj tutaj vivoj prizorgis la farmon kaj malsanajn parencojn

Tiun argumenton la granda plimulto de la juĝistoj ne sekvis. Ili deklaris, ke la fratinoj vivis en alia rilato ol gejaj aŭ lesbaj paroj. Tial ne estus diskriminacio, ke ili pro sia alispeca parenca rilato ne povas eniri registritan partnerecon.

La fratinoj montris sin ŝokitaj post la juĝo. "Ni ne komprenas, kial ni devas tion travivi dum niaj jam maljunaj tagoj", ili deklaras per komuna proklamo. "Nia sola krimo estas, ke ni ne estas edzinoj, ĉar ni vartis niajn gapatrojn kaj du onklinojn ĝis ties mortoj.



**Eŭropa Juĝa Kortumo Por Homaj Rajtoj**

Ĉar ili nun trapasisi ĉiujn jurajn instancojn, la frationoj volas atentigi pri sia situacio per apelacio al la brita registaro. Sukcespromesa tio ne estas. Ili jam de 30 jaroj provas instigi la administraciojn por ŝangi la leĝojn.

En la germana urbo Bad Schwartau en la jaro 2004 estis simila kazo: du malgejaj oldulinoj registriĝis kiel partneroj por sekurigi sin reciproke. Sed tio estis laŭleĝa, ĉar ili nur estis bonaj amikoj kaj ne parencoj. En ŝtatoj kiel ekz. Svedio aŭ Austrio, la du fratinoj ne plu havus problemojn, ĉar en la plej multaj landoj de la Eŭropa Unio la heredaj taksoj intertempe estas forigitaj el la leĝaro.

## Partnero ricevas pension

Geja "vidvo" Tadeo Maruko el Germanio skribas Eŭropan jurohistorion. La viro en la jaro 2001 ligis sin oficiale per registriĝo al sia vivpartnero, kies profesio estas kostumfaristo en teatro.

Kiam tiu mortis kvar jarojn poste, la prizorga instituto de la germanaj scenejoj (VddB) rifuzis al li la elpagon de pensio por postlasitoj. Malleĝe, kiel la Eŭropa Juĝa Kortumo (EJK) konstatis, kiun la Bavaria Juĝejo Administracia alvokis por fine klarigi la aferon.



**Eŭropa Juĝa kortumo en Luksemburgo**

Pli prezice la EJK konstatis, ke post la morto la postlasita registrita vivpartnero havas la saman rajton je prizorgado de postlasitaj kiel geedzo. Tio estas novaĵo, ĉar tiu konstato antaŭe ĉiam estis malkonfirmata de germanaj juĝejoj. La EJK rigardis la konduton de tiu prizorga instituto de VddB kiel rompo de la direktivo 2078 de la Eŭropa Unio pri anti-diskrimiacio, kiu jam trovis sian vojon en la germana leĝaro.

Fundamenta ankaŭ estas, ke la unuan fojon estis konstatata, ke la kaŭzo de la samrajtigo de vivpartneroj kun geedzoj en la prizorgado de postlasitaj estas tiu, ke la unuaj same kiel la aliaj havas la leĝan devon reciproke zorgi pri siaj vivrimedoj.

La juĝo momente nur validas por la specifa persono kaj la specifa prizorga instituto de publika statuso. Sed por la tuta Germanio tre gravas la nun proklamitaj kaŭzoj, ĉar la konservativuloj en siaj deklaroj ĉiam argumentis, ke oni leĝe povas trakti malsame vivpartnerecojn kaj edziĝojn tial, ke ili ne estas samaj aferoj. Tiun argumenton nun forprenis la EJK.

La politiko certaflanka nun ja povas provi dehokiĝi per ruzaj ĉirkaŭvojigaj argumentadoj kaj metodoj. Sed la konsekvenco estos, ke ili regule estus tirata antaŭ la EJK kaj ĉiam ricevanta nazosangigan rebaton. La juĝo tiel estas sukcesa paŝo rilate al la samrajtigo en aliaj publikaj arealoj, ekz. la oficista, la soldata kaj la administracia. Por ĉiuj novaj iniciatoj leĝproduktaj oni nun povas bazigi sin sur tiu juĝo. La konservativuloj nun ne plu povas sin defendi kontraŭ tiaj leĝoj.



# KACOJ: francaj la plej longaj?

**Esploroj pri niaj plej delikataj valoraĵoj**

Laŭ esploro de la germanaj asocio "pro familia" kaj la universitato de Essen la averaĝa longeco de peniso troviĝas en la intervaloj de 7 kaj 10 centimetroj en la mola stato kaj de 11 kaj 17 centimetroj en la malmola stato. Tiuj rezultoj validas por 96% de la kazoj. Signifikantaj alistatoj de la peniso, t.e. pli granda aŭ pli malgranda, do nur faktas ĉe 4% de la germanaj viroj. Laŭ tiu esploro la staranta peniso je la averaĝo montras 14,48 centimetrojn de longeco kaj diametron de 3,95 centimetrojn.

La plej longa peniso iam mezurita ĉe viro longas 34,3 centimetrojn kaj havas perimetron (!) de 15,9 centimetrojn. Tiu viro ne nur ekzistas kiel famo aŭ legendo, sed estas medicine atestita. Dokumentita kaj pruvita per fotoj tio estas farita per d-ro Robert L. Dickinson en Usono. Aliaj seksualeco-esploristoj kiel Kinsey aŭ Masters & Johnson raportas, ke ili dum siaj esploroj en esceptaj kazoj rigardis kacojn de 23 ĝis 30,5 centimetrojn.

Kontraste al tio oni povas legi en aliaj medicinaj publikigaĵoj, ke medicinistoj dum siaj ekzamenoj trovis penisajn longecojn de ne plu ol unu centimetro. La fakvorto por tio estas "mikropeniso". Per kirurgiaj metodoj oni povas atingi en tiuj kazoj plilongigon de la peniso, sed tamen nur por rezultoj de eble tri aŭ kvar centimetroj.
Mirige nun estas, ke en gejaj profilaroj renkontocelaj tre multaj viroj posedas superavaraĝajn gigantobastonojn. Kaj ju pli junaj la homoj, des pli oftaj ili ecigas sian plej valoran parton per XXL. Seksaj fantasioj kaj deziroj tie ŝajnas iomete distiri la propran percepton. Neniu kun dekdu centimetroj devas depresiviĝi, fakte li troviĝas inter la plimulto.



Finita estas la kresko de la kacoj en la aĝo de ĉirkaŭ 18 aŭ 19 jaroj. Estas trankvilige scii, ke dum la vivojaroj la plej bona parto de la viro ne malkreskas. Eĉ por tio ekzistas esploroj, kaj tiuj diras, ke ne ekzistas mencindaj diferencoj inter la penisoj de junaj kaj maljunaj viroj. Nur rilate al la dikeco la junaj viroj havas iomete pli

grandajn valorojn, mezurita kaj je la glano kaj ja la bazo.

Ĉu afrikaj viroj vere havas averaĝe pli grandan martelon ol eŭropaj? Kaj ĉu vere asiaj generiloj estas pli ofte pli malgrandaj? Seriozan respondon al tiu tre disfama inter gejoj antaŭjuĝo oni ne povas doni, ĉar tiurilata internacia esploro ankoraŭ mankas.

La ĝis nun publikigitaj esploroj pri tiu demando ĝis hodiaŭ nur posedas pli malpli amuzigan valoron. Tiel nereprezentiva esploro de la hispana firmao Andromedical resumas kiel rezulton, ke la najbaraj francoj havas la plej longajn: kun averaĝa peniso de 15,75 centimetroj la francoj okupis la rangon unu en la monda kacolisto. Kiel internacia averaĝa longeco de la peniso tiu indikis 13,97 centimetrojn. La duan rangon gajnis la italoj kun preskaŭ 15 centimetroj. Sub la averaĝo troviĝas la britoj kun malpli ol 13 centimetroj, dum la hindoj atingas eĉ nur ĉirkaŭ 10 centimetrojn. La lasta rango vidas la sudkoreojn kun 9,4 centimetrojn. Tamen troveblas tre delikataj Tajlandaj knaboj de 1,60 metroj de alteco kun vere supergrasaj pendumaĵoj.

La stara forto de peniso cetere estas mezurata je kilogramoj. La pezon, kiun starkaco per fiksita ledoŝnurumo sub optimalaj cirkonstancoj en la vertikalo maksimume povas levi, tio estas nomita la starforto en kilogramoj. Kutime estas valoroj inter 10 kaj 25 kilogramoj. Tiun eksperimenton tro ofte ripeti, tio tute ne estas rekomendata.

## KACULOJ: feliĉa en Tajlando?

### Gimnasio kaj siaj gegejaj necesejoj

Lernejo en Tajlando volas per apartaj necesejoj por gejoj kaj transseksuloj agadi kontraŭ ataketumado.

La ŝtata Kamphaeng-gimnasio en la nord-tajlanda urbo Sisaket konstruis la novajn necesejojn post pridemandado de la gelernantoj. Laŭ tiu, ĉirkaŭ 100 gejaj kaj transseksaj lernantoj estis viktimoj de malbonfaroj flanke de siaj kunlernantoj. La direktoro de la lernejo, kiu jam estis ricevinta premiojn pro la pureco de la necesejoj de sia lernejo, pro tio ordonis la konstruadon de la specialaj nedesejoj. Laŭ raporto de la Bangoka "Daily Express" la tiurilataj lernantoj estis entuziasmaj, ke ili nun havas siajn propraj necesejojn.



Tajlando estas granda aglomerejo de la viro-al-virino-transseksuloj nomitaj "ladyboys". La asia lando loĝata de 65 milionoj protektas kiel la unua ŝtato de Asio "homoj kun aliaj seksaj identecoj" kontraŭ diskriminacio. La konstitucio, kiu enhavas tiun teksteron, estis per referendumo akceptita nur lastjare.


# P o r n o g r a f i o ?  Du landoj, du konceptoj

## M a l a j z i o: Porna pasto

En Malajzio torentas protestoj kontraŭ nova marko de dentopasto. La nomo "Oral Me" havas pornografian subsignifon, skoldas islamismanoj kaj konservativuloj.

"Tion oni devus ne permesi", citas la "New Straits Times" la kunlaboranton de la "Consumers Association of Penang", Hatijah Hashim. Por li estas tute nekomprenebla, kiel povas realiĝi la permeso por tiu marko. "Mi estas ŝokita. Tiajn vortojn oni trovas ĉe ŝercaj artikolaĉoj", indignas ankaŭ Martin Voon, varbada fakulo el Kuala Lumpur. Instruisto de la angla Kieran Sharkey el Sabaj antaŭ ĉio maltrankviliĝas pri gejunuloj. "Mi sentas, ke ili povus misinterpreti tiun nomon."

"Oral-me"-produkisto Kulim el la Malajza federacia lando Kedah ĝis nun nenion deklaris pri la riproĉoj. Lia plej granda konkurento, la "Pro Dental B Corporation" kontraŭe montris sin senemocia. "La nomo ja nur diras, ke temas pri orala produkto", diras Sunny Saw, la afergvidanto.



## G e r m a n i o: deca peniso

Fotoj de nudaj viroj kun rigida kaco en kalendaro ne estas malpermesata pornografio laŭ la kompreno de la 4a punsenato de la Berlina ĉambro-juĝejo. Tial ĝi lasis libera la eldonanton de la kalendaro. La kalendaro ne faras el la modeloj objektojn de avido.

Tiu kalendaro celata al gejoj ne estas, argumentis la juĝistoj, tiel enpaĝigita, ke ĝi nur incitas allogaĉe seksualajn tiklojn kaj ĝi ne faras el la viroj nurajn objektojn de voluptaj streboj.

La prokuroro du jarojn antaŭe estis plendinta pri du kalendaroj el la jaroj 2004 kiel "disvastigo de pornografiaj verkoj". La ĉambra juĝejo malakceptis la pledon je revizio fare de la prokurorejo kaj tiel finis jarojn daŭrantan juran kverelon pri la en la interreto ofertitaj kalendaroj.

La juĝejo orientiĝis laŭ la juĝoj de la federacia juĝa kortumo, laŭ kiuj seksaj okazaĵoj devas ne esti ŝovita en la malfono en "rude penetranta maniero". Se oni rigardas la tuto de la artaĵo, tiel juĝis la Berlina kortumo, oni povas rimarki, ke la aktoroj postlasas impreson de memfiero.

Jam la distrikta juĝejo estis trovinta, ke la "viroj lasis sin foti volonte kaj libervole". La eldonanto dum la proceso estis pledinta por "malferma kaj honesta memprezento de la viro"

# T E M O J ∘ ∘ ∘ ∘ ∘

## Kajman-Insuloj: <u>danĝera kiso</u>

La registaro de la Kajman-Insuloj pardonpetis oficiale de geja turisto el Usono. Tiu, la 23jara Aaron Chandler, estis arestita antaŭe pro tio, ke li kisis sian amikon en dancejo. "En la nomo de la kompleta ministrejo de turismo mi pardonpetis pro la skuiga travivaĵo. Mi asertas al vi, ke la Kajman-Insuloj elkore bonvenigas ĉiujn vizitantojn.", deklaris la turisma ĉefino Pillar Bush en malferma letero al Chandler kaj ties partnero. "Kio okazis al vi estas unuopa afero, kiu ne estas reprezenta por la Kajman-Insuloj. Ni scias, ke miloj de gegejaj vizitantoj venas al ni por ĝui siajn feriojn".

La turismo enspezigas tri kvarojojn de la brutta socialprodukto de la Kariba insulogrupo, La plej multaj vizitantoj venas de Usono. Post la okazaĵo gejoj kaj lesboj estis avertataj per la hejmpaĝo wikitravel.org kontraŭ vizito de tiu brita transmara arealo de 45.000 enloĝantoj.

## Teksaso/Usono: <u>danĝera kraĉo</u>

42jara viro Willie Campbell estas juĝata al 35 jaroj de prizono de juĝejo en Dallas, ĉar li kraĉis en la vizaĝon de policisto. La avizaj juĝistoj taksis kiel fakto, ke la akuzato Campbell uzis sian salivon kiel armilon publike danĝeran. Li devas pasigi la duonon de la tempopuno minimume, poste la juĝo, kondiĉe de bona konduto de la prizonulo, povas esti metata en la stato de neapliko.

La evento okazis jam en majo 2006. Tiam oficisto volis aresti Campbell'on pro ebrieco en la publiko. "Li sin returnis kaj kraĉis al mi", deklaris la policisto Dan Waller. "Li trafis mian okulon kaj mian buŝon. Post tio li rakontis al mir, ke li suferas je Aidoso. Mi tuj serĉis ion, per kio mi povu lavi miajn okulojn."

## Filipinoj: <u>danĝera deodoranto</u>

Filmeto publikigita en la retportalo YouTube kaŭzis konsekvencojn neagrablajn al kirurgistoj de hospitalo en la filipina urbo Cebu (ĉ. 600 km-ojn sude de Manila). La filmeto montras dozenon da homoj en operaciejo, kiu ridas kaj fijubilas dum observi kuracistojn tirumi deo-skatolon el la pugo de viro. La hospitalo intertempe pardonpetis de la 39jara kliento kaj promesis iniciati internan esploron por eltrovi la respondulon.

Laŭraporte la viro post ampleksa ebriiĝo okaze de la jarfino 2007 estis mendinta junan amoriston je prezo de 100 peso'oj (1,50 eŭroj). Sed kiam la viro plendis pro tro malgranda kaco de tiu, la amoristo ŝajne por venĝi sin enŝovis la skatolon, kion la viro ne rimarkis, ĉar li estis tro ebria.


Nur kiam li vekiĝis, la viro sentis en la anala regiono doloron kaj vizitis tial la doktoron. Tri tagojn poste la operacio estis plenumata, kion la dungitoj de la hospitalo videble misinterpretis kiel iom malfruan novjaran festivaleton.

**Francujo: mortis J.D. Cadinot**

La legendiga reĝisoro de famaj pornografiaj filmoj, la franco Jean Daniel Cadinot [ĵo danjél kadinó] mortis en la aĝo de 64 jaroj en Parizo. Ekde la jaro 1980 li surbendigis ĉirkaŭ 70 kompletajn filmojn de geja erotiko. Liaj opusoj ĉiam elstaris el la amaso de la porno-industriaj produktoj, ĉar li metis apartan gravon je la rakonto kaj la arta prezentado de siaj filmoj. Ankaŭ pro siaj bonhumoro kaj ironio ili superis similajn produktaĵojn.

Sur la franca hejmpaĝo de Cadinot www.cadinot.fr la morto de la majstro estis tiel proklamita: "Kiam vi tion-ĉi legos, mi estos demetinta mian kameron, malŝaltinta la lumojn, ferminta la kurtenojn kaj farinta mian lastan riverecon."

Ĉe la fino la vivoĝojo de Cadinot estas resumata per tiaj vortoj: "rigida faluso estas simbolo de la vivo, dum kruco estas simbolo de morto."



**Danujo: postmorta renkontejo**

En Kopenhago estas nun malfermita la unua tombejo por gejoj kaj lesboj. Ĝis nun estas spaco por 45 urnoj.

Dum vivaj tempoj gejoj ŝajne preferas ulumi en festoj okaze de kanto-kontestoj ol en futbalaj stadionoj. Kial do ili post la morto ne restadu en por ili agrablaj medio kaj socio, demandis sin pastoro Ivan Larsen el la urbo Kopenhago. "Ni havas niajn proprajn lokojn por renkontiĝi kaj amuziĝi - gejaj trinkejoj kaj aliaj. Pro tio ni nun volas ankaŭ propran tombejon", deklaris la pastoro en la Dana Radio. Kaj fondis konsekvence la asocion "Regnbuen", t.e. ĉielarkon.

Kontraŭ 2500 kronoj (335 eŭroj) gajaj kaj lesbaj membroj de la asocio ricevas dekorecan urnoplacon por la tempo post la pensiono. Tiu estas rezervata pere de Regnbuen en tombejo de Kopenhago, en kiu ankaŭ estas enterigita la gejfratino" Hans Christian Andersen, fama verkisto de fabeloj. La lasta restadejo havas ĝis nun spacon por 45 finpaliĝintaj.

La malgranda separata tombejo por la gesamseksemuloj estas kovrita per graveloj, ĉe la rando estas plantitaj floroj en formo de trianguloj. Apude staras granda tomboŝtono, sur kiu troviĝas la ĉielarka flago. "La triangulo estas nia malnova simbolo, sed ankaŭ simbolo de nia sufero!", tiel diras Larsen, kiu memorigis, ke en la naziaj koncentrejoj la gejoj devis porti sur la vestoj rozkolorajn angulojn.

Per la geja tombejo Larsen, kiu por si kaj sia partnero jam estas rezervinta loketon tie, ne volas apartigi sin de la malgeja mondo. Li kontraŭe rigardas ĝin kiel restadejon en la rondo de sia "familio". "Ni ne volas nin izoligi, sed kredas grave, ke ni estas kune. Ni rigardas tion kiel familian tombon. Iun, pri kiu nia familio fakte zorgos.